AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado

Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Austrio. — Telefono R 33-3-64

8a jaro | Junio 1953 | n-ro 6

Aŭstria Pompeji sur Magdalenensberg en Karintio.

En la aŭstria liglando Karintio, 15 km norde de ties ĉefurbo Klagenfurt leviĝas la Magdalenensberg, monto 1055 metrojn alta. Ĝian supron nuntempe kronas gitika preĝejo. La monto pro sia elrigardebleco super grandan parton de la lando estas multe vizitata. Sed jam en antaŭaj epokoj ĝi havis grandan signifon. Tion pruvas multaj trovaĵoj el antikavj tempoj, faritaj sur la deklivo de la monto kaj ties ĉirkaŭaĵo. Inter ili la plej altvalora estas la t.n. "Junulo de Magdalenensberg", bronza statuo de greka deveno el la 5a jarcento antaŭ Kristo.

Pro tiu kaj aliaj trovaĵoj (tombejo, templo ktp.) la scienculoj konjektis, ke sur Magdalenensberg jam dum la romana, eĉ kelta epokoj de la lando situis grava urbo. Tia la Landa Muzeo de Karintio kun subteno de la Aŭstria Arkeologia Instituto en Vieno ekde la jaro 1948 grandstile faras elfosadojn sur Magdalenensberg, kiuj jam ĝis nun havis grandiozajn rezultojn.

El tiuj oni nun scias, ke sur la supro kaj deklivoj de Magdalenensberg situis la ĉefurbo de la kelta reĝlando Norikum, kiu etendiĝis de la rivero Inn ĝis la hungaria malaltebenaĵo kaj de la Danubo ĝis Karawanken-montaro. En la jaro 15 a.Kr. la romanoj okupis tiun landon kaj elstarigis en ties ĉefurbo sur Magdalenenberg belegan templon kaj luksajn konstruaĵojn kiel reprezentantojn de la mondimperio de Romo, kiujn oni nun malkovris sur artefarita ebenaĵo nur 70 m de la supro. Surprizaj kaj vere mirindaj estas la ĝis nun faritaj elfosaĵoj: muroj, ĝis du-eĉ trietaĝaj, kun bone konservitaj pentraĵoj, belaj mozaikplan-

koj, hejtinstalaĵoj, akvokondukiloj ktp. Tre multnombraj estas la diversaj uzobjektoj de la ĉiutaga vivo:ceramikaĵoj,ostoj, kuiriloj, glasoj, lampoj, ornamaĵoj kaj ĉiuspecaj iloj ŝtonaj, bronzaj kaj feraj.

Eksterordinare interesaj,precipe por scienculoj,estas la multnombraj enskriboj sur muroj kaj ŝtonoj, kiuj nun permesas tute novajn enrigardojn en la romanan kaj keltan epokojn de nia lando.Ĉi ĉio kaj multa alio rajtigas nin,paroli pri la antikva urbo sur Magdalenensberg kiel pri la aústria Pompeji.

La elfosaĵoj kaj trovaĵoj estas kolektataj en la t.n. "Reprezentacia Ðomo",originale restarigita kiel muzeo.La elfosado estas daŭrigata kaj la kompetentuloj atendas ankoraŭ gravajn sukcesojn.Por plifaciligi al la en-kaj eksterlandaj interesuloj la viziton de la elfosejo,la karintia registaro konstrugis belan aútomobilan straton sur la monton ĝis la elfosejo.Tiu ĉi strato por si mem estas vizitinda,ĉar ĝi per multaj kurbaĵoj kondukas tra ĉarma,varioplena pejzaĝo ĝis alto de looo m, de kie oni ĝuas belegan rigardon super grandan parton de la lando kun ĝiaj kasteloj, lagoj kaj montoj.

Ankaŭ vi, karaj partoprenontoj al la VIa Aústria Esperanto-Kongreso kaj Internacia Esperantista Renkonto de la 22a-24a de julio en Klagenfurt havos okazon, viziti la supre menciitajn vidindaĵojn, ĉar la L.K.K. enprogamigis ankaŭ peraŭtobusan ekskuson al la kastelo Hochosterwitz kaj sur Magdalenensberg.

La Loka Kongresa Komitato,
Klagenfurt, Sternallee 5, Karintio.

E i n W o r t a n a l l e .

Zu Ende des kommenden Monates soll die österreichische Esperantistenschaft in Klagenfurt, der Hauptstadt unseres landschaftlich reizvollen Bundeslandes Kärnten zusammenkommen. Leider hat Kärnten die schwächste Esperantobewegung Österreichs, trotz des großen Opfermutes unserer dortigen Samideanoj - für dort kann man nicht einmal die Vorsilbe "Ge" anwenden! - insbesondere des Kol - legen D ü r r s c h m i d , der bereits 1948 ohne jede Hilde den wirkungsvollen Esperantostand in der damaligen Gewerbeausstellung in Klagenfurt einrichtete. Die begei -

sterungsvolle Initiative unserer wenigen Pioniere in diesem zweisprachigen Bundeslande wird vom Landeshauptmann, dem Bischof des Landes,dem Bürgermeister der Kongreßstadt u.a.anerkannt. Die Solidarität der österreichischen Esperantistenschaft jedoch erscheint nicht imposant: trotz dieser Tatsachen haben sich erst rund 5o Personen zur Teilnahme angemeldet, welche offenbar mit ihrem Verständnis dafür allein stehen, daß das L.K.K. viel leichter und besser arbeiten könnte, wenn hinter ihm eine bedeutende Anzahl Interessenten stünde, die auch ihren Beitrag frühzeitig geleistet hätte; denn die Veranstaltung des Kongresses kostet Geld und die Mühe e h r e n a m t l i c h e r Gesinnungsfreunde.

Die Freunde in Innsbruck, Salzburg, Wien und Wörgl bitte ich dringend, ihre Einladungen für die Teilnehmer am 38. Weltkongreß in Zagreb derart zu formulieren, daß diese unbedingt Klagenfurt berühren und mit den Innsbrukkern usw. über Klagenfurt fahren, damit sie auch an unserem Kongreß teilnehmen, denn unser Kongreß ist ja auch als V O R K O N G R E S S vom 38. Universala Kongreso de Esperanto anerkannt!

So wollen wir also alle zusammenhelfen, damit die hohen Protektoren unseres"VI."nicht durch eine zu geringe Teilnehmerzahl aus dem In- und Auslande bloßgestellt werden und daß die Esperantobewegung in Kärnten endlich aufblühe anstatt untergehe, was eine unvermeidliche Folge des Mißlingens unseres VI. Österr. Esperanto-Kongresses wäre. Verhindern also wir alle einen solch fürchterlichen Ausgang der langjährigen Bemühungen so treuer Streiter Zamenhofs wie wir sie in den Mitgliedern des Loka Kongresa Komitato besitzen!

(Laŭ E-a originalo.) Dr.Adolf Halbedl.

INFORMOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

G r a t u l o n al nia estratano kaj estro de la E-kluboj " KALOCSAY-LABORO " Robert N o v a ĉ e k , kiu en majo nunjare faris la ŝtatan E-ekzamenon"kun distingo"!

LA ESTRARO DE AEF.

KOLEKTOKAMPANJO "PRESILO" ĝis redaktofino rezultigis la sumon de S 1.741.75.Kontribuis: Grupo "KONKORDO" (6o),

"VERDA STELO",Vieno V (5o),ges-roj Kogler (5), Rödl,dir. Menacher, Zajicek (po 1o). La kampanjo estas daŭrigata-aliĝu al la kontribuantoj, kiu ankoraŭ ne sendis sian donacon!

Redakcia komuniko. AER V/53 pro la kongresaferoj estis eldonata en amplekso de 12 paĝoj.Laŭ decido de la estraro de AEF dum la maja kunsido AER en junio kaj septembro aperu same 12paĝa;en julio kaj aŭgusto pro ferioj kaj la AEKongreso ne aperos la revuo.

El la protokolo de la maja kunsido de la estraro de AEF: S-ro Cech raportis,ke petskribo de AEF pri subvencio de la urbo Vieno laŭ informo de la magistrato estis transdonata al la kompetenta Stadtrat Mandl.Dum la VIa Aŭstria E-Kongreso en Klagenfurt estos uzata ekstra poŝtstampo.De

N i a c e l o en tiu ĉi somero:
LA VIa AŬSTRIA ESPERANTO-KONGRESO en Klagenfurt
okazonta de 1'22.-24.7.1953.

Adreso: Klagenfurt, Postfach 2o5;
pagoj : al Postsparkassen-Konto 3o.434.
Kotizo: S 15.--, familiano S 8.--

A N O N C U V I N T U J ! Ankaŭ tiuj, kiuj ial vere ne povas veturi, **a l i ĝ u n e p r e,** por **m o r a l e s u b t e n i** la kongreson!

s-ano Hofrat Steiner alvenis la sciigo, ke la vicprezidanto de Stadtschulrat (urba instru-konsilistaro)de Vieno promesis al la direktoro de la Internacia E-Muzeo, ke la lernejoj estos oficiale atentigataj pri la ekzisto kaj vizitindeco de la muzeo. Generaldirektoro de la aŭstria poŝtadministracio, nia honorprezidanto d-ro Dworschak konsentis,eniri la protektkomitaton de la AEKongreso en Klagenfurt.La kasistino,s-ino Loibel, informis pri la kasostato: 2o.5.53 - S 2.o99.o7. S-ano Berdan komunikis, ke laŭ decido de ASLE, (Aŭstria Socialista Ligo E-ista)la sumo de S 67o.--, pruntita de la E-Centro siatempe, estos donacata al AEF kiel kontribuo al la kostoj de translokiĝo kaj kiel kompenso por la gastigado de ASLE en la ejoj de la E-Centro.

Oskas Sinner:

Semu, sed sur konjekteble fekunda grundo!

Nia tuta Esperanto-movado dependas de la demando, ĉu ni sukcesas lerte kaj efike varbi novajn kaj laŭeble junajn adeptojn. La valoro de ĉiu lingvo dependas ĉefe de ĝia disvastigiteco. Pro tio ni varbu kun lerteco, kun ĝentileco kaj per agrabla maniero. Ni semu kaj semu, sed kie kaj kiel?Laŭ miaj propaj penadoj kaj spertoj mi volas montri ekzemplojn:

Dum la lastaj jaroj mi rigardis ĉiam en mian ĵurnalon sub la rubrikon "Vorträge" kaj trovis kelkfoje anoncitan paroladon aŭ diskutadon,kiu laŭ sia titolo konjekteble strebis al celo, simila al Esperanto. Mi legis pri ekspozicio de la aŭstria UNESKO-komisiono. Mi iris por viziti ĝin kaj tie interparolis kun funkciulo, laŭdante la interesan ekspozicion,sed tamen konstatante gravan mankon: kvankam la ekspzicio ĉiuloke atentigis pri la bezono de interkompreno kaj interkonsento de la popoloj, la verda stelo en la tuta ejo ne estis videbla.Por la deklarita celo unu komuna lingvo ja estas nepre necesa. La deĵoranta sinjoro tuj min komprenis kaj proponis al mi, ke mi skribu tiurilate al la sekretario d-ro Besci. Tion mi faris kaj ricevis favoran respondon.Mi opinias,ke tiel estu farintaj la Vienaj samideanoj amase, ĉu jes?

Meze de aprilo mi vizitis diskutadon de prof.Thirring, prof. Pfeifer kaj iu prof-ino en Stöbergasse pri la temo: "Ĉu permesate,ke potenculo perfortu la malfortulon?"Parolis unue la profesoroj,poste personoj el la ĉeestintaro. Ankaŭ mi parolis: "Sie haben hier Erkenntnisse gewonnen, wonach mit allen Mitteln anzustreben sei, daß Vergewaltigungen nicht vorkommen,vielmehr ist in allen Fällen Verständigung anzustreben.Nun erlaube ich mir aber, an alle Anwesenden die Frage zu richten:Welche Nutzanwendung werden Sie mit den hier gewonnenen Erkenntnissen machen,nachdem Sie von hier gegangen sein werden?Was werden Sie tun?" -"Gar nichts",hörte ich eine leise Stimme von rückwärts. "Ja,gar nichts, so höre ich soeben eine leise Stimme von rückwärts und ich glaube auch, daß Sie nicht wissen werden, wie Sie tun sollen, um die gewonnenen Erkenntnisse praktisch anzuwenden.Aber ich will Ihnen einen Vorschlag

machen und sagen, wie Sie sehr wohl die hier gewonnenen Erkenntnisse und Ihren Willen zu friedlicher Verständi - gung in die Praxis umsetzen können: Interessieren Sie sich für Esperanto!"

Nun mi parolis pri Esperanto, pri organizo, pri miaj spertoj. Videble la ĉeestintoj kun intereso aŭkultis. Poste denove parolis prof.Thirring. Li aludis miajn vortojn kaj parolis favore al nia lingvo.

Kelkajn tagojn poste mi legis en la gazeto, ke d-ro Schnell parolos pri la temo "Europäische Gesinnung und Jugenderziehung", Eschenbachgasse 9. Jen afero por mi.Do mi sidiĝis en la mezo de l'salonego kaj aŭskultis kun intereso la paroladon de d-ro Schnell, kiu ja tre bone parolis pri la nunaj, laŭtempaj postuloj rilate la edukadon de la lerneja junularo. La sekvintan diskutadon ankaŭ mi partoprenis kaj mi diris:"Die Ausführungen des Herrn Dr. Schnell haben mir gut gefallen und besonders ein Wort ist mir aufgefallen, das Herr Dr. Schnell wiederholt betonte, denn gerade dieses Wort "Anachronismus" ist es, das auch ich immer voranstelle. Gerade mit diesem Worte bezeichne ich selbst immer die Wurzel aller Übel, die wir schon seit Jahrzehnten mitmachen müssen. Wir stehen in einem Jahrhundert des ungeheuren Fortschritts der Technik, des Verkehrs usw. und müssen gleichzeitig die so furchtbare Zurückgebliebenheit in der Gestaltung Europas mit seinen vielen Grenzen und Sprachen feststellen."Cetere mi atentigis pri Esperanto kaj rakontis pri nia movado. Post nelonga parolado mi sidiĝis (longa parolado enuigas nepre) kaj jen granda surprizo:D-ro Schnell ekstaris sur la podio kaj respondis al miaj vortoj en flua Esperanto. Kompreneble ĉe tia surprizo mi ne povis silenti, sed tuj vokis: "Kia surprizo, kia ĝojigo! Per plej bona maniero vi aprobas miajn vortojn, bonege!" Subite vigla aplaŭdo tra la tuta salonego.Ree mi estis surprizita. Videble granda parto de la publiko simpatiis al Esperanto.

Samideano, iru kaj agu same!

-

.....

Sen kongreso ... jen sukĉeso kaj regreso:

pro progreso - kaj sukceso - a l K O N G R E S O!

.....

KATOLIKA ESPERANTISTA VIVO.

AKLE Vieno, leteradreso: W. Mudrak, Vieno 3.,Beatrixg. 19. Informe al ĉiuj AKLE-anoj kaj -amikoj: Ni kunvenos ankaŭ dum julio kaj aŭgusto ĉiun 2an kaj 4an mardon de la monato de 17-2oa h. en I., Graben 13/25!

Diservo posttagmeza (Maiandacht-dummaja Diservo honore al la Dipatrino) okazis 14.5.en Hirschstetten.Estas tie nova paroĥo kun provizora, modesta, sed digna preĝejeto, kies paroĥestro P. Albert Beathaler C.M.F. estas fervora lernanto en la nunjara E-kurso de AKLE-Vieno.Tre aktualan, viglan E-predikon faris P. Bruno Hebenstreit, franciskano el Graz. Malgraŭ la tre periferia situo de la okazejo ĉeestis 6o ges-anoj. Post la preĝado la anaro amike kunestis en la paroĥa ĝardeno, E-lingve kantante kaj aŭskultante gajigan legadon de s-ano Gasperini.

Presservo de AKLE: "Die österr. Furche" (28.3.) 9 lin. pri 24a Int.Kongr. de katolikaj E-istoj en Lourdes; "Wr. Kirchenblatt" (15.2., 29.3.) po 5 lin. pri kongreso en Lourdes; "Kalasantiner Blätter" (III/53) 39 lin. pri katolika presejo en Indonezio; "Offenes Wort" (18.4.) 14 lin. pri "E. en Lourdes"; "Kalasantiner Blätter" (V/53) "La nederlandaj sindikatoj pri la inunda katastrofo, 3o linioj. --- En la aŭstria radiostacio "ROT-WEISZ-ROT" la 3o.5. estis disaŭdigata komuniko pri la Int.Kongreso de la katolikaj E-istoj de 11.-15.8. en Lourdes. Estis ankaŭ menciate, ke en Lourdes estas la tombo de pastro Emile Peltier, fondinto de la katolika E-movado.

Sciigoj de Aŭstria Socialista Ligo Esperantista

ASLE fine de aprilo dissendis cirkuleron al multaj socialistaj E-istoj kun la komuniko pri sia fondo kaj aldonis poŝtpagilon,por ke la aliĝ- kaj jarkotizo por 1953 (S 5.--) tuj povu esti pagata. Ni devas konstati, ke nia peto ne de ĉiuj gek-doj estis plenumata kaj tiujn ni alvokas, plej baldaŭ aliĝi kaj enpagi ilian kotizon.

En Drobollach, Karintio, la Socialista Instruista Unuiĝo okazigis konferencon,en kies kadro la 3.5.53 k-do ĉeflernej-direktoro F. Watzinger (Villach) faris germane paroladon pri "Esperanto im Dienste der Völkerverständigung".

La Esperanto-Komitato de la Socialista Laborista Partio Usona eldonis en E. broŝuron (18x13 cm, 16 pĝ.), en kiu koncize estas priskribitaj la politikaj kaj ekonomiaj principoj de la nomita partio.

Pro la ferioj dum la monatoj aŭgusto ne okazos la monata kunveno de la Vienaj gek-doj en la E-Centro, sed en septembro ekestu nova aktiveco!

KOMUNISTA ESPERANTISTARO

La 1-a de Majo en Vieno.

La Vienaj komunistaj Esperantistoj kolektiĝis kun simpatiantoj de la E-movado ĉe Stalinplatz sub la devizo "Ni varbas por la lingvo de la mondpaco".La plej maljuna E-isto, k-do Marsänger, 88jarulo, kunmarŝis. La transparentoj "Per Esperanto por socialismo" kaj"Esperanto, die Sprache der Völkerverständigung" rikoltis grandan aplaŭdon.Ofte la k-adoj estis kore aklamataj de la spalirstarantoj. La Viena eldonejo "Globus" ekspoziciis grandfoton de la komunista E-grupo,kiu partoprenis la manifestacion okaze de la la de Majo.

AŬSTRIA PACRONDO ESPERANTISTA

Aperis bulteno samnoma,informilo n-ro 2, marto/aprilo 1953. Ĝi enhavas serion da kontribuoj, rilatantaj al la pacmovado kaj speciale okupas sin pri la okazigo de "Internacia Renkontiĝo de E-istaj Pacdefendantoj en St. Pölten,Malsupra Aústrio. Por tiu ĉi aranĝo estas proponitaj la tagoj de 28.-30.8. aŭ 4.-6.9. ĉijare. La prepara korespondado laŭ la informilo vigle progresas.La pritraktotaj programercj estas: a) kiel la E-istoj efike laboru en la pacmovado,b) packorespondado kaj interŝango de libertempuloj, c) efika organizado de la E-tradukservo, ĉ) interligilo de la E-istaj pacdefendantoj. - La adreso de la prepara komitato estas: s-ano Antonio Balague,St.Pölten, Kirchweg 12. La unuaj 5o anoncitoj senkoste ricevos tranoktejon, la aliaj pagos modestan prezon.

Informoj: S-anino Krautschneider transprenis la kontaktadon kun Österr.Friedensrat.La Viena Pacrondo E-ista kunvenos merkrede,la 24.6. je 19 h en la E-Centro. En la kunveno de la rondo de 1'27.5. partoprenis s-ano Balague el St. Pölten, kiu raportis, ke la organo de la pacrondo

trovis en eksterlando tre favoran eĥon."Franca Esperantisto","Nova Pacilo"(Anglio),"Pacdefendanto"(ČSR)kaj sveda E-pacinformilo represis vastajn partojn el ĝi.

Korespondadreso: Steffi Krautschneider, Vieno VI., Aegydig. 12.

Facetbriloj el la Esperanto-mondo.

La membraro de UEA laú "Esperanto"III/53 atingis je 31.12.52 la nombron de 16.185 individuoj el 79 laŭdoj. Internacia Kultura Semajno okazos de 3.-10.8.53 en Kultura Esperanto-Dono,Grésillon. Informas detale kontraú internacia respondkupono G.Odent, Lycée de LAON, Aisne, Francio.La Kultura E-Dono akceptos laŭeble de junio ĝis septembrofino ĉiulandajn E-istojn. Eventuale iam ajn ankaú karavanojn. Informpeto, sendota kun resp.kup, al K.E-D., Grésillon, Baugé,M-et-L., Francio. -- Deziras korespondi 15 gelernantoj kun ges-anoj tutmondaj.Skribu tuj al N.H. Naylor, 8 Greenland Villas, Queensbury, BRADFORD, Yorks, Anglio.-- Japanaj 2ooo geklubanoj deziras korespondi kaj interŝanĝi pk.,pm.kaj gazetojn:Esperanto-Koresponda Klubo,Oka (HIRAKATA CITY),Osaka, -- S-ano Tibor Sekelj, instruinte 7o universitatanojn,fondis "Salvadoran Esperanto-Asocion" -- Jarlibro 1953 de UEA, ampleksanta ĉifoje 271 paĝojn,i.a. informas,ke dum 1952 la delegitaro faris pli ol 4.ooo servojn. -- Sennacieca Revuo,Nova Serio,n-o 81, jaro 1953,aperis. La broŝuro, plaĉe kaj multe ilustrita, prezentas kolekton de kontribuoj el la plumoj de eminentaj Esperantistoj. Ĝi meritas ĉies atenton.Mendebla en la E-Centro. -- Jugoslavio: Miloj da novaj kursanoj estas raportataj el la diversaj lokoj de la lando.-- En la lernejo por socia esplorado in Ipsden apud Oxford,Britio,okazis eksperimento kun samtempa instruado de la itala lingvokaj Esperanto al tri diversaj grupoj. Nombro da filologoj, psikologoj kaj sociologoj sekvis la eksperimenton. -- En la nederlanda ĵurnalo "Winschoter Courant" aperas 2oleciona E-kurso,kombinata kun lecionoj parolaj.La plej bonaj lernintoj vojaĝos por lo tagoj al Danlando aú Francio je la kosto de la gazeto. -- Ludoviko Glodeau, membro de la Ekzekutiva Komisiono,de la Direkcio kaj de la Plenumkomitato de SAT, mortis. Li estis Esperantisto ekde 19o5 kaj partoprenis preskaú ĉiujn SAT-kongresojn.Nun lia la-

borriĉa vivo ĉesis per kancero kaj la tuta SAT-anaro funebras pro la perdo de lia kara kaj valorega persono.

Univ.Kongreso de E. en Zagreb fine de aprilo registris 1.25o aliĝintojn el 27 landoj.--Esperanto en la servo de la sveda ŝtato: Ek de la nuna jaro 1953 la ŝtata ĝarden-eksperimentejo en Alnarp uzas E.kiel resumlingvon en siaj laborraportoj. Tiuj aperas plurfoje ĉiujare kaj estas dissendataj al universitatoj,bibliotekoj,ĝardenaj eksperimentejoj kaj similaj institutoj en la tuta mondo.- En la Sveda Somera Semajno,Frostavallen, Höör(1o-16.8.) kunlaboras la sveda UNESKO-konsilantaro kun la Sveda E-Instituto.Prelegos Ivo Lapenna(Jugoslavio),Julia Isbrükker,(Nederlando),Lakshmiswar Sinha(Hindio), Karl Söderberg, John Stenström kaj Jan Strönne (Svedio)pri la temaro "Int.Kulturinterŝanĝo" "NOTIZIARIO INTERNATIONALE", perioda,modele redaktata porgazetara informservo de niaj italaj kolegoj,meritas la atenton de ĉiu serioza propagandisto por nia lingvo.La n-ro de aprilo enhavas entute 19 lerte redaktitajn informojn,(ĉiuj ne tro longaj)prenitajn el la Esperantaj eventoj de la tuta mondo.Resumo pri la enhavo de la kajero por la internacia gazetaro kaj indiko de la gazetaro (mulnombra!),kiu represis el la antaŭa n-ro, kompletigas nacilingvan informilon, kiu estas certe ekzempla por ĉiuj landaj E-asocioj!-- La bibliografio de Tito en 32 tagoj: Ĉu traduka rekordo?La eldonkooperativo de slovenaj E-istoj entreprenis la eldonon de la bibliografio de Tito en Esperanto, intencante ĝian aperigon okaze de la Univ.Kongreso de E. en Zagreb.La verko, 175.ooo vortoj sur 444 paĝoj,estis tradukata dum 32 tagoj kun la meza rapideco de looo vortoj po horo. -- La Kvina Kongreso de IFEF en Utrecht,kiu okazis de 5.-lo.5.,estis partoprenata de 41o fervojistoj el 12 landoj. La aranĝo, sukcesa en ĉiuj rilatoj, elvokis la intereson de multaj superaj fervojinstancoj kaj aŭtoritatoj de multaj landoj. Ankaŭ nia urbestro,s-ano Jonas salutis la kongreson.Gravaj fakaferoj estis traktataj, inter ili la fervojista terminologio. Inter alio oni eksciis, ke la membraro de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj dum kvin jaroj kvinobliĝis.--Foiro de Padova uzas Esperanton propagande kaj koresponde. -- Por si mem kaj por kelkaj amikoj japana s-ano deziras korespondan kontakton kun aŭstriaj geesperantistoj. Skribu al Yotsugi Yazaki,Momono-

moto-cho 16, Kamikyo-Ku, Kyoto, Nippon, Japanio. -- La 26a Kongreso de SAT okazos en Ŝefildo, Britio, de 25.-31.7. 53. Adreso de O.K.K.:K-ino H.Melton, 19, Brentwood Grove, Birmingham 22 A. Provizora programo: Sabato: Akcepto de kongresanoj ĉe Wortley Hall; dimanĉo: Solena Malfermo en "Memorial Hall", Ŝefildo; lundo: unua laborkundido, vizito al fabrikoj kaj akcepto de urbestro; mardo: dua laborkunsido, duontaga ekskurso; merkredi: tria laborkunsido, popoldancado de lokaj dancgrupoj; ĵaŭdo: tuttaga ekskurso al Jorko; vendredo: gaja vespero. -- Polio: Funkcias la E-movado en Polio. La "Asocio de Esperantistoj en Pollando" estas leĝe registrita societo kun sidejo en Varsovio, Marszalkowska 81. Dum 1951 la sekretariejo de la asocio ricevis 1.018 leterojn kaj presaĵojn, En la sama jaro la sekretariejo sendis 4.327 leterojn kaj presaĵojn. En tiuj nombroj gazetoj ne estas enkalkulitaj.--"Berlin hodiaŭ", jen faldprospekto, kiu estu mendata de Verkehrsamt Berlin, Fasanenstr. 7-8, Berlin-Charlottenburg 2. -- San Benedetto del Tronto, Italio, la okazejo de granda internacia ŝakturniro, invitas al veno la geesperantistojn, En eleganta marborda vilaĝo en brila dancfesto oni elektos la "Miss Ŝakon" de la regiono. Oni aranĝos ankaŭ ekskurson al la tute apuda sanktejo de Loreto. Tempo: 5.-18.7.53. Pro persona invito skribu al d-ro Gianfranco Guidi, Via Nizza II, Roma (105), Italio.-- "Laborista Esperantisto", Nederlando, raportas, ke en publikaj bibliothkoj de 21 lokoj de la lando estas prunteblaj entute 1.266 E-libroj.--Ĉekoslovakio: La E-asocio en tiu lando devis esti likvidata. Oni konsilas al ni, sendi denun ĉion Esperantistan al s-ro Jaroslav Ŝustr, Dlouha lo, Praha 1.--Hektografitaj bultenoj, sufiĉe ampleksaj kaj montrantaj persistan kaj aktivecan spiriton tamen evidentigas, ke la E-movado en la tuta lando ne ĉesis ekzisti. "LA PACDEFENDANTO" sub redaktado de k-do Rudolf Burda, Palackeho nám, c.6, Plzen, meritas ni. an admiron kaj la alsendadon de niaj eldonaĵoj.--Invito al la 25a KONGRESO DE LA ITALAJ E-ISTOJ, kiu okazos de 5.-9.9.53 en Como. Petu aliĝilon, respektive la belegan, kolorriĉan prospekton pri la paradiza Lago de Como de la Ente Provinviale Turismo, Piazza Cacciatori delle Alpi , C o m o , Italio!

Vbb.
(Zl. 3216/47)

Informo por Vieno: Marde, la 23.6.53, je 19 h en Naturamika Hejmo, 15., Diefenbachg. 36, s-ano K r a l Johann raportos pri vojaĝimpresoj en USONO (s-ano Kral estis kun edzino dum 6 monatoj en Chicago ĉe la familio de sia filo.Li kontaktis kun la tieaj E-istoj. La veturo okazis tien kaj returne per flugmaŝino).

Adiaŭo de la redaktoro.

Karaj geamikoj,kun tiu ĉi numero de nia AER finiĝas la periodo de mia redakta agado. Kaŭzo deĵora devigas min, trandoni la verkadon de nia gazeto al nova redakcio.Mi esperas, ke ĝenerale vi estis kontentaj pri la maniero, per kiu mi redakte "naĝigis nian ŝipeton "AER" tra la ŝaŭmantaj ondoj,de niaj deziroj kaj la rifoj de niaj malvastaj financaj ebloj." Estu donataj al la nova redakcio tiuj ĉi premisoj, kiuj kapabligos ĝin, oferti al vi,karaj gesamideanoj,la revuon tia, kia mi deziradis prezenti ĝin al vi: riĉenhava, belaspekta kaj inda al la ideo de nia Majstro!

Mi kore dankas al ĉiuj, kiuj helpis min, speciale al samideanoj d-ro Grimme kaj Rajmund Cech.

Hugo Kraus.

Lasta sciigo: Pluaj donacoj por la presilo alvenis de grupo Wr. Neustadt (8o), membroj de la grupo Wr. Neustadt (35), dir. Kaftan (25), M. Stöckl (2o), Majtanic kaj Beckmann (po 1o). Dankon al la donacintoj! Ĝisnuna sumo: S 1.921.75.

Kaj ankoraŭ unu agrabla informo: Ministerio por instruado de Austrio komunikis al AEF, ke gi decidis asigni al gi subvencion de S 1ooo.--.

Eigentümer und Herausgeber: Österr.Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche W i e n XV., Fünfhausgasse Nummer 16
Druck:Offset Vervielfältigung,ADRESSEN-SUPPAN Wien IV., Brucknerstr.2, U 41-2-7o